



Kulturaj Kajeroj

E.M.A.M.E. →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Jarabono : 50 fkoj

13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

NOVEMBRO-DECEMBRO

1981 - 6

KULTURAJ KAJEROJ

1981

NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Tunizio : magio pro maro kaj suno

S. Guillot

La agonio de la fregato « Semillante »

A. Daudet
trad. A. Ribot

Emeljano-laborulo kaj malplena tamburo

L. Tolstoj
trad. P. Poliŝĉuk

Humora paĝo

I. Nagy

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn orelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Ŝanĝoj okazis en la kalendaro de nia programo. La tradiciaj tri trisemajnaj periodoj malaperis. Ĉu bona decido? Ni atendu la rezultojn. Detaloj pri tiu decido aperas en la franca lingvo (« Entre nous ») kaj la kutima traduko en esperanto (« Inter Ni »). En tiuj verdaj folioj oni ankaŭ parolas pri la novaj tarifoj. La detala programo estas preta kaj vi povas peti ĝin kaj jam rezervi vian ĉambron.

Kelkaj aliaj ŝanĝoj aperas sur la « tarifo-folio ». Unu el ili ŝajnas esti iom drasta : la rezervado de ĉambro estos efektiva post pago de la aliĝkotizo, kiel kutime, sed ankaŭ de 10 % de la tuta kosto. Tiuj sumoj ne estas repageblaj. La rezervita ĉambro estos konsiderata denove libera post alven-malfruo de unu tago (unusemajna rezervado), du tagoj (dusemajna rezervado), aŭ tri tagoj (trisemajna rezervado), kiam la rezervinto ne antaŭanoncis sian malfrumon. KREDU, ke tiu decido ne estis farita sen hezito, sed iu fenomeno ŝajne tendencas disvastiĝi.

Jam de tri jaroj ni ofte diras duon ŝerce, ke ne multaj ĉeestantoj alvenas kaj foriras je la anoncita dato. Kiam temas pri alveno tro frua aŭ foriro malfrua ni provas solvi la problemon kaj plej ofte sukcesas. Sed kiam temas pri pli malfrua alveno aŭ pli frua foriro, plejofte sen averto, tio signifas perdo por la Domo, ĉar la ĉambroj restas kelkajn tagojn senhomaj. La perdo estas ankoraŭ pli granda, kiam temas tute simple pri aliĝintoj, kiuj tute ne venas kaj neniam skribas eĉ poste. Manko de ĝentileco, kaj ankaŭ perdo grava por la Domo. Se ni adicias la financajn rezultojn de tiuj « malgravaĵoj » ni konstatas, ke la sumo perdita estas granda. Pro tio ni devis fari decidojn, kiuj espereble ĝenos nur la « senpripensuloj ».

Esperanto tra la Mondo



La 67a universala kongreso prepariĝas en Antverpeno :

- Lia Reĝa Moŝto Balduino de Belgio akceptis esti Alta protektanto de la kongreso.
- Senatano Fernand Piot (membro de U.E.A.) prezidos la lokan komitaton.
- Temo de la kongreso : « Generaciaj aspektoj de la esperanto-movado ».
- Oni decidis eldoni specialan poŝtmarkon honore al la kongreso. Krome, prepariĝas ekspozicio pri esperantaj poŝtmarkoj.
- Unu tuta tago estos dediĉita al la instruado de Esperanto.
- La 50a internacia kongreso de blindaj esperantistoj, en ligo kun la universala, okazos en Breda (Nederlando).
- La kongresejo estos la konferenca salono de la Reĝa Zoologia Ĝardeno (apud la stacidomo). La kongresanoj ĝuos senpagan aliron al la ĝardeno.

Preludo al la centa datreveno de Esperanto :

La komitato de U.E.A. aprobis dum la kongreso de Brazilo la malnetan planon por la periodo 1983 — 87, okaze de la centa datreveno de Esperanto en Julio 1987. Oni antaŭvidas ke la kongreso de 1987 okazos en Varsovio sub formo de dusemajna festivalo.

La kongreso de 1983 pritraktos la « komunikan teknologion en rilato al Esperanto ».

Ĝis 1987, estos eldonitaj aŭ reeldonitaj gravaj verkoj. Diversaj klopodoj estos faritaj en la internaciaj kaj naciaj instancoj, en la informaj medioj, ktp...

Konsiderante ke Pollando estis la patrujo de Esperanto, la Esperanto-asocio de tiu lando jam starigis laborgrupon kiu jam preparas propran nacian planon.

Estas notinde ke, en Francio, S.A.T. - amikaro jam publikigis plurajn numerojn de bona franclingva propagandilo kaj informilo nomata : « Objectif Esperanto 87 ». U.F.E. iniciatis « Klubo-87 »-n, klubo de volontulaj subtenantoj.

Modernaj kampanjoj :

— En Germanio, Esperanto-Centro Paderborn daŭrigis sian kampanjon « Testo 5000 ». La respondeculoj unue proponis artikolojn al ĉiuj germanaj gazetoj, al bibliotekoj. Jam pli ol 1000 personoj favore reagis por eklerni la internacian lingvon surbaze de moderna instru-materialo.

— En Francujo, U.F.E. iniciatis la « metodon KVAR » (depono de testfolioj en « strategiaj lokoj »).

Renkontoj 1982 :

— La 55a kongreso de S.A.T. okazos de la 31a de Julio ĝis la 6a de Aŭgusto 1982, en Islami, Finnlando.

— Kongreso de S.A.T.-amikaro : 11a — 12a de Aprilo (Pasko), en Saint-Pierre de Chandrieu (Rhône).

— 2a Tutamerika kongreso de Esperanto, en Bogota (Kolombio), 17a — 18a de Julio.

— Juna Internacia renkontiĝo en Hoeven, inter Breda kaj Roosendaal (aranĝo de la junaj nederlandaj esperantistoj), 9a — 12a de Aprilo (Pasko).

— Internacia Foiro Esperantista Renkontiĝo, en Leipzig (G.D.R.), 12a — 14a de Marto.

— Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno ; en Morzine (Francio), 27a Februaro — 6a de Marto 1982. Informas G. Horn, 75, rue G.-Péri, 93310 Le PRE-SAINT-GERVAIS.

Agado en Estonio :

Dum la lastaj monatoj, okazis en la soveta respubliko Estonio scienc-teknika konferenco (en Tallinn), renkontiĝo de 65 estonaj ĝelernantoj kaj pedagogoj de 13 lernejoj, junulara tendaro en Parnu (150 gejunuloj el diversaj sovetaĵoj).

Lernolibroj, vortaroj, estos eldonitaj en 1982.

En Britujo :

La membrocifero de la Parlamenta Esperanto-Grupo en Britujo estas nun 146 (el 5 politikaj partioj).

Bona informa libreto tradukita :

La bonega franclingva libreto de Prof. Janton, « L'Esperanto » (kolekto « Que sais-je ? » N° 1511) aperis en germana lingvo. Traduko estis ankaŭ farita en la hispanan kaj baldaŭ en la italan.

Niaj bibliotekoj deponejoj de la esperanta kulturo :

Ekzistas en la mondo, grandaj bibliotekoj, kiuj atestas pri la graveco kaj disvolviĝo de la literaturo de Esperanto.

La ĉefaj estas :

— Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, oficiala fako de Aŭstria Nacia Biblioteko, instalita en la palaco Hofburg. Ĝi, interalie, entenas 17 900 volumojn, pli ol 7 000 fotojn, aŭtografajn, filmojn, kasedojn, sonbendojn, diskojn, multajn dokumentojn.

— Biblioteko Buther, en Esperanto-Asocio de Britujo, en Londono. Oni trovas en ĝi 11 000 librojn, 1 000 binditajn volumojn de gazetoj. Entute, la katalogo listigas 30 000 erojn.

— Biblioteko Hodler de Universala Esperanto-Asocio kunigas 3500 librojn, diskojn, milojn da broŝuroj, kongreslibrojn, manskribaĵojn de Zamenhof, volumojn de periodaĵoj, arkivojn.

— Esperanto-fondaĵo de la publika biblioteko de Kortrijk (Belgujo) : 2 500 libroj, 5 000 volumoj de binditaj gazetoj.

— Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Internacia Lingvo, en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds (Svislando). Ĝi enhavas informilojn pri la diversaj projektoj de internaciaj lingvoj, milojn da libroj, revuoj, muzeeto Edmond Privat.

— Esperanto-fako en Bulgara Nacia Biblioteko « Kirili Metodij ». (la akademia kaj universitata biblioteko havas ankaŭ esperanto-kolektojn).

— En Hungario, ni mencias la bibliotekon de Szeged (1 400 volumoj, la heredaĵo de Julio Baghy, revuoj) kaj la bibliotekon de la universitato Eötvös Lorand (volumoj pri Esperanto kaj interlingvistiko).

— Ekzistas aliaj gravaj bibliotekoj en Parizo, en la nova Aŭstralia Nacia Esperanto-biblioteko, en la nacia esperanto-muzeo de Gray (Francio), en la Kulturdomo Grésillon, en la Hispana esperanto-muzeo de Saint-Paul d'Ordal, kaj en multaj aliaj lokoj de la mondo.

Nova disko de Olivier Tzaut :

Oni memoras pri la unua disko de Olivier Tzaut, « Tra l'mondo ». Nun aperis la dua : « Karnavaletto ». Ekzistas versio en kasedo.

En Novjorko :

Lige kun la 29a kongreso de Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko, la urbestro de Novjorko, Edward Koch, sole deklaris la semajnon 12^a - 18 Julio « Internacia Amikeca Esperanto-Semajno » en tre favora teksto.

Tunisio : magio pro maro kaj suno

Malfermata al la blovoj de la alta maro, laŭlonge de 1 200 kilometroj, Tunizio estas precipe mediteranea. Plej diversaj estas la marbordoj en Tabarka, Tuniso, Kartago, Bizerto, Ghar el Melh. Ĉe la norda fasado jen multarbaj arbaroj kaj plaĝoj kun fajna sablo, borderitaj de klifoj, kiuj taŭgas por la submara fiŝkaptado. Klimato tonika kaj viviga permesas ripozon kaj malstreĉiĝon.

Oriente, Hammamet, Monastir, golfo de Gabes kaj golfeto de Zarzis allogas la turistojn. Dum 7-8-monatoj-jare la suno brilas. Sed sur tiuj plaĝoj, en Sahara-dekoro, la varmo estas dolĉigita de la freŝeco de la klara blua maro kaj de la aromplena blovo el la oazoj.

Lumplenaj marbordoj

Sablaj plaĝoj tute malsamas : ĉe Bon-Kabo jen oranĝarboj kaj jasmeno-plantadoj ; en Sousse, Monastir, estas oliv-arboj kaj la unuaj palmoj ; laŭlonge de la bordoj jen sovaĝaj kaj rokaĵ insuloj : la Galite, Zembra ; aliaj insuloj tute

plataj : Kerkennak, Djerba. Feliĉaj insuloj kun ora sablo ; tie nur lumo. Dum horoj oni povas, kuŝita sur sablo, nur aŭskulti la maran murmuron kaj ĉion forgesi.

Salluste jam diris : « La plejmulto el la afrikaj loĝantoj mortas pro maljuneco, malofte pro malsaneco ».

Ĉe vojkruciĝo de jarmilaj civilizacioj

Tunizio estas riĉa je gloraj memoraĵoj. En tiu parto de norda Afriko unue loĝis gentoj, kiujn la Latinoj nomis Numidoj kaj la Kristanoj Berberoj. Tiuj primitivaj nomadoj starigis siajn tendojn inter la palmoj, meze de la dunoj aŭ borde de plaĝo.

Urbetoj, malgrandaj reĝolandoj naskiĝis. Unu el tiuj urboj naskita el la XVI-a jarcento antaŭ Kristo, Combée, pli poste fariĝis Kartago (= la nova ĉefurbo). Multaj legendoj, religia historio parolas pri tiu aristokrata respubliko, kiu restis longtempe la rivalo de Romo ; ĝiaj postrestaĵoj atestas ĝian grandiozon : ruinoj de



la Nova Tyr (Tiro), tombaj sanktejoj, domoj, mebloj, juveloj ; ĝia grandeco, ĝiaj riĉaĵoj, ĝiaj fruktodonaj marbordoj igis ĝin alloga por la ĉirkaŭantaj potencoj ; ĝi suferis invadojn de Romanoj, Vandaloj, Bizancanoj kaj Araboj. Malgraŭ tiu miksaĵo de rasoj kaj civilizacioj estas la lando mem, kiu markis per sia propra stampo la popolojn, kiuj alterne venis.

Kortuŝanta poezio de la tradicioj

La multaj civilizacioj, kiuj tie sin intersekvis alportis siajn tradiciojn kaj kutimojn, kiujn Tunizio, laŭlonge de la jarcentoj, adoptis aŭ adaptis al si. En Djerba la « Gugu » — danco memorigas kelkajn aziajn dancojn, bildigante la lukton de la militistoj ; la orienteca danco de la tuniziaj virinoj elvokas la « Mil kaj Unu Noktoj »-n.

Ĉiu spektaklo, de nordo al sudo elvokas unu vizaĝon de la Historio : « Malouf » de la andaluzia Hispanujo, tatuaĵoj de la berberaj virinoj la feaj desegnoj de la tapiŝoj.



Ĉarma estas la kontrasto inter moderna kaj tradicia artoj, kies verkoj, tra la « souk »-oj, tapetas la malgrandajn budojn : florado de multkoloraj objektoj, brilantaj, odorantaj kaj emoci-belaj : potaĵoj de Djerba aŭ Nabeul ; matoj, brodaĵoj kaj puntaĵoj de Nabeul.

Nobleco de la antikvaj islamaj urboj

En tiu kavalkado de jarcentoj, en tiu mozaiko de civilizacioj estas Islamo, kiu plej markis la tunizian vivon. Ĝia orienteca karaktero plene floras en ĝiaj moskeoj. En Tuniso la Granda Moskeo Ez Zitouna samtempe kultejo kaj fama universitato datumas je 732. Laŭlonge de la jarcentoj ĝi estis renovigita de la sinsekvaj dinastioj. En Kairouan Islamo markis homojn kaj aĵojn. El la terasoj ĉie staras kupoloj kaj minaretoj, kiuj atestas la religian vivon de la urbo. La « souk »-oj tipe arabaj montras la socialan strukturon.

En Monastir « Ribat », de sobra stilo, estas bildo de la Konkerinta Islamo, samtempe batalanta kaj pia.

Oazoj

Jam de la pli malproksima Antikveco la oazoj alportis sonĝojn al la homoj ; Grekoj vidis ilin, kiel « insulojn perditajn en Oceano » ; la Romanoj ilin elvokis kiel « makulojn de panterohaŭto ».

Dank'al sia sahara-mara pozicio, Tunizio havas tre diversajn oazojn ; ili estas maraj laŭlonge de la Gabes-golfo, ŝotaj en Djerid kaj Nefzaoua.

En Tamerza, sur monto, neimageble fluas kaskadoj de freŝa akvo meze de dezerta regiono. Tie la daktil-palmoj tronas kun la piedoj en akvo kaj la branĉ-bukadoj sub suno. La kvalito de ĝiaj « Deglet-Nour » (Lumo-Daktiloj) famigas Tunizion. En ombro de la palmoj kreskas abrikot-arboj, persikarboj kaj granatarboj. En aŭtuno la rikolto estas festo.

Akvo

Ĉu persona ĉu komunuma propraĵo (ĝia dispartigo estas multjarcenta organizado) ĝia abundeco aŭ malabundeco determinas la riĉecon de la tero.

Akvo fluas, gravite, en la « seguias », kiuj serpentumas tra la ĝardenoj por irigacii kulturajojn kaj por trinkigi homojn kaj bestojn. Dispartigiloj devias akvon al la diversaj kvartaloj de ĉiu oazo.

Dank'al akvo oazo estas tiu feliĉa tero, kie abundas vegetaĵaro ; ĝi permesas tiun kontraston : la riĉa verda palmejo kaj la nuda vastaĵo, kiu tiun ĉi ĉirkaŭas.

Estas kvazaŭa miniatura mondo ; ĝi vivas per si mem. Sed ĝi ankaŭ estas la loko, kie oni renkontiĝas kaj interŝanĝas varojn ; ĉi tie intensa vivo kunvenigas la tieajn loĝantojn kaj la nomadajn paŝtistojn. Malgraŭ la sablaj vastaĵoj, kiuj apartigas la oazojn, la komerco ĉiutempe estis prospera ; ĝi povas okazi dank'al kamelo ; starita sur siaj longaj stilzoj ĝi estas obeema kaj plej bone vivas nur meze de dezertoj ; ĝi transportas ĝis Nigra Afriko, daktilojn, delikatajn ŝtofojn interŝanĝitajn kontraŭ tropikaj artikloj.

Saharo

« La morgaŭon, al ĉio mi preferis dezerton » (A. Gide).

Ĉu biblia vidaĵo ? Ĉu luna pejzaĝo ?

Kelkfoje la palmoj grupiĝas en verdaj bukedoj duonkaŝitaj en sablo ; Tiaj estas la « Korboj » en Nefta.

Ĉie tie la domoj estas disigitaj kiel peonoj sur grandega ŝaktabulo, laŭ la plej bonaj teroj. La traboj de la domoj estas el palmo-ligno : gipsokrusto kaj kalkaj tavoloj liveras konstru-ŝtonojn.

Simplaj estas la domoj : kelkfoje labirintaj koridoroj kondukas al centra korto ĉirkaŭita de la ĉambroj.



Ŝot El Djerid

Ĝi estas granda salita lago, kiu pigrece etendiĝas kaj duonigas Tunizion ; ĝia fundo estas jen sponga, jen kovrita je akvo-tavolo, laŭ la sezonoj. Pli ol unu surprizon ĝi proponas : jen la multkoloraj rebriloj, kiuj, kvazaŭ rite, akompanas la sunleviĝon kaj sunsubiron ; jen la kontrastoj akcentitaj de varmo aŭ malvarmo ; jen la miraĝoj ĉiam renovigitaj, kiuj movbriligas ĝian surfacaĵon ; ĝia beleco igis poetoj la loĝantojn de Djerid. Abou el Kacem Chabli, kantoro de Tunizio, ĉi tie naskiĝis ; ĝia tiea tombo longe estos inspiro-fonto por multaj generacioj.

S. GUILLOT.

LA AGONIO DE LA FREGATO "SEMILLANTE" (semijant)

de Alphonse Daudet (alfons dode)

Ĉar la mistralo de la antaŭlasta nokto nin ĵetis sur la korsikan marbordon, aŭskultu mian rakonton pri terura marafero, pri kiu la fiŝkaptistoj ankoraŭ babilas dum la vesperkunvenoj, kaj pri kiu hazardo liveris al mi tre kuriozajn informojn.

Tio okazis antaŭ du aŭ tri jaroj...

Mi transnavigadis la sardan maron kun sep aŭ ok doganŝipanoj. Laciga vojaĝo por novulo. Dum la tuta Marto, ne estis eĉ unu tago bona. La orienta vento jam atakis nin kaj la maro konstante furiozis.

Iun vesperon, kiam ni fuĝis for de la ŝtormo, nia ŝipo trovis ŝirmejon ĉe la enirejoj de la markolo de Bonifacio, meze de masivo da insuletoj... Ilia aspekto estis neniel alloga; altaj rokoj nudaj kovritaj de birdoj, kelkaj absintaj tufoj, makizo da lentiskoj kaj dise, en la ŝlimo, putriĝantaj lignoblokoj; sed verdire, por pasigi la nokton tiuj misaspektaj rokoj pli taŭgis ol la rufo de malnova ŝipo kaj ĝi kontentigis nin.

Apenaŭ elŝipiĝintaj, la ŝipanoj ekbruligis fajron por la bujabeso, la ŝipestroj vokis min kaj montris etan terenon fermitan per blanka masonaĵo, for ĉe la ekstremo de la insulo.

— Ĉu ni iros al la tombejo? li demandis.

— Ĉu tombejo, mastro; kie do ni troviĝas?

— Sur la insulo Lavezzi, sinjoro. Tie ĉi dormas subtere la ses cent viroj de la Semillante, ĉe la loko mem, kie ilia fregato diseriĝis, antaŭ dek jaroj. Kompatindaj! Ili ne akceptas multajn vizitantojn; ni almenaŭ salutu ilin, ĉar ni estas ĉi tie.

— Tutkore, mastro.

Kiel malgaja estis la tombejo de la Sémillante. Mi ankoraŭ ĝin memoras, kun ĝia malalta mureto, ĝia rustiĝinta ferpordo nefacile malfermebla, ĝia senbrua kapelo kaj centoj da nigraj krucoj, kaŝataj de l'herbo. Neniu imortelo crnamis ilin., neniu memoraĵo... nenio.. Ha! Kompatindaj mortintoj forlasitaj, kiel ili sentas malvarmaj sin en sia hazarda tombejo!

Tie ni restis surgenuaj. La mastro laŭte preĝis. Enormaj laroj, unikaj gardantoj de tiu

tombejo rondflugis super niaj kapoj kaj miksis siajn raŭkajn kriojn kun la lamentado de l'maro.

Post la preĝo, ni malgaje reiris al la angulo de la insulo, kie la barko estis ligita. Dum nia foresto, la ŝipanoj ne malŝparis sian tempon, ni trovis altflaman fajron ŝirmatan de roko, kun fumanta marmito. Ni cirkle sidiĝis kun niaj piedoj al la fajro kaj tuj poste, ĉiu el ni ricevis sur siajn genuojn en ruĝa tertelero du tranĉojn da nigra pano kun abunda trinkaĵo. La manĝo okazis silente; ni estis malsekaj, ni malsatis, kaj la apudeco de la tombejo... Tamen, kiam la teleoroj estis malplenaj, oni ekbruligis la pipojn kaj oni babilis iomete; kompreneble, pri la Sémillante.

— Sed, fine, kiel okazis la katastrofo? mi demandis la mastron, kiu, kun sia kapo en la manoj, penseme rigardis la flamojn.

Kiel okazis la katastrofo? respondis la bona Lionetti, kun profunda suspiro, ve! sinjoro, neniu en la vasta mondo kapablus rakonti. Nur tion ni scias, ke la Sémillante, plena je soldatoj al Krimeo, forlasis Tulonon la antaŭan vesperon, kun malbona vetero; nokte, la danĝero kreskis. Vento, pluvo kaj furioza maro, kiel oni neniam antaŭe vidis... Matene, la vento kvietiĝis iomete sed la maro daŭre koleregis kaj krome malbeninda nebulo tia, ke oni apenaŭ distingis lumigilon, kvar paŝojn for. Sinjoro, oni ne povas suspekti, kiel perfidaj estas tiaj nebuloj! Ne gravas, mi supozas, ke la Sémillante perdis sian stirilon en la mateno; ĉar malgraŭ la nebulo, la ŝipestro, sen difektego, neniam venus frakasiĝi sur tiuj rokoj. Li estis ja tre sperta maristo, kiun ni bone konis. Li antaŭe estris la korsikan stacion tri jarojn kaj konis la marbordon tiel perfekte kiel mi, kiu konas nur tion.

— Kaj laŭ vi je kioma horo pereis la Sémillante?

— Supozeble, tagmeze; jes ja, sinjoro, tagmeze. Sed pro la marnebulo, tiu tagmezo estis preskaŭ tiel nigra kiel faŭko de lupo. Iu doganisto sur la marbordo, rakontis al mi, ke tiun saman tagon ĉirkaŭ la 11.30 li eliris el sia dometo por fiksi la ŝutrojn kaj la vento forrabis lian kaskedon kaj riskante, ke la ondegilo lin forportos, li postkuris ĝin kvarpiede. Nu, laŭdire, tiu viro, levante sian rigardon distingis tutapu-

de kaj en nebulo grandan ŝipon kun veloj falditaj, kiun la vento rapidigis al la insulo Lavezzi. Tiu ŝipo kuris tiel rapide, ke la doganisto ne havis tempon por atente rigardi. Ĉio pensigas nun, ke temis pri la Sémillante ĉar post duonhoro, la paŝtisto de tiu insulo aŭdis sur tiuj rokoj... Sed jen ĝuste venas tiu paŝtisto, sinjoro, li mem rakontos al vi. Saluton, Palombo ! Venu varmigi vin ! Ne timu !

Viro kun kapuĉo kiu vagis de kelka tempo ĉirkaŭ nia fajrejo kaj kiun mi erare konsideris maristo, ĉar mi ne sciis, ke paŝtisto vivas sur la insulo, timeme alproksimiĝis al ni.

Estis maljuna leprulo, trikvarone idiota, kaptita de mi ne scias kia skorbuta malsano, kiu kaŭzis dikajn lipojn abomenajn. Oni grandpene klarigis al li pri kio temas. Tiam levante perfinĝre sian malsanan lipon, la maljunulo rakontis, ke, efektive, la diritan tagon, ĉirkaŭ tagmeze, li aŭdis ekde sia kabano teruregan krakadon sur la rokoj ; ĉar la insulon plene kovris la akvo, li ne povis eliri kaj nur la sekvantan tagon, malfermante sian pordon, li vidis la marbordon plenan je frakasaĵoj kaj kadavroj forlasitaj de l'maro. Terurigita, li rapidis al Bonifacio per sia barko por ricevi helpantojn.

Laca pro sia longa rakonto, la paŝtisto sidiĝis kaj la mastro daŭrigis :


— Jes, sinjoro, tiu kompatinda maljunulo venis averti nin. Li estis preskaŭ freneza pro timo, kaj pro tio lia cerbo restis iom difektita. Verdire, ne estis sen kaŭzo. Imagu ses cent kadavrojn amase kuŝantajn sur la sablo, miksitajn kun lignaĵoj kaj tolpecoj. Kompatinda Sémillante ! La maro ĵus frakasis ĝin unubate kaj tiel perfekte, ke el ĉiuj restaĵoj la paŝtisto Palombo nur grandpene trovis la necesajn lignaĵojn por starigi palisaron ĉirkaŭ sia kabano. Pri la viroj, preskaŭ ĉiuj malbeligitaj kaj abomene kriplitaj, estis korŝire vidi ilin, kunligitajn plurope. Ni trovis la ŝipestron en pompa uniformo, la kapelanon kun sia stolo ĉe la kolo. En angulo inter du rokoj, juna ŝipknabo kun okuloj nefermitaj. Oni povus pensi, ke li ankoraŭ vivas... Sed ne. Estis antaŭskribite ke eĉ ne unu postvivos !

Tiam la mastro haltis

— Atentu, Nardi ! li kriis, la fajro malviglas.

Nardi ĵetis sur la braĝon du aŭ tri pecojn da gudritaj lignaĵoj kiuj tuj ekflamis kaj Lionetti daŭrigis :

— Nu, jen la plej malĝojiga detalo de tiu historio. Tri semajnojn antaŭ la sinistro, eta korveto, kiu veturis al Krimeo kiel la Sémillante, pereis sammaniere kaj preskaŭ ĉe la sama loko. sed ĉifoje, ni sukcesis savi la ŝipanojn kaj dudek soldatojn, kiuj troviĝis surŝipe... Tiuj kompatindaj viroj sentis sin tute senkomfortaj ! Oni kondukis ilin al Bonifacio kaj ni gastigis ilin du tagojn en la mardomo... Kiam tute sekaj refreŝigitaj, ĝis ! bonan ŝancon ! ili revenis Tulonon, kie, kelkajn tagojn poste, oni enŝipigis ilin denove al Krimeo. Divenu sur kiu ŝipo... Sur la Sémillante, Sinjoro. Ni retrovis ilin ĉiujn dudek kuŝantajn inter la mortintoj ĉe la loko kie ni sidas. Mi mem levis belan brigadiston, kun delikataj lipharoj, blondulo pariza, kiun mi gastigis hejme kaj kiu ĝojigis nin per



siaj rakontoj... Lin vidi tie premis mian koron. Ha ! Sankta Patrino !

Tion dirinte, la bona Lionetti, emociplena forskuis la cindrojn de sia pipo kaj sin envolvis

en sia surtuto dezirante al ni bonan nokton. Dum kelkaj minutoj pliaj, la ŝipanoj plu babilis kune kaj duonlaŭte... Poste la pipoj sin sekve estingiĝis... Oni ne plu parolis... La maljuna paŝtisto iris for kaj nur mi sonĝadis meze de la dormantaj ŝipanoj.

Ankoraŭ impresita de la funebra rakonto ĵus aŭdita, mi provis reprezenti en mia penso la kompatindan ŝipon estintan kaj la historion de tiu agonio, kies nuraj atestantoj estis la la-roj. Kelkaj detaloj, kiuj frapis min, la ŝipestro en pompa uniformo, la stolo de la kapelano, la dudek soldatoj helpis min diveni ĉiujn elementojn de l'dramo. Mi vidis la fregaton forlasi Tulonon dumnokte. Ĝi elflosas el la haveno. La maro estas malkvieta kaj la vento terurega. Sed la ŝipestro estas diligenta maristo kaj ĉiuj estas trankvilaj surŝipe.

Matene, marnebulo ekaperas. Oni ekmal-kvietiĝas. La tuta ŝipano estas sur la ferdeko. La ŝipestro ne deiras de la surpoŭpo ; en la interferdeko, kie la soldatoj loĝas, estas senlume ; la atmosfero estas varma. Kelkaj malsanas, kuŝante sur siaj sakoj. La ŝipo malkviete tangas, neeble stari. Oni parolas sidante surplanke, grupope kaj alkroĉante sin al la benkoj ; necesas kii por esti aŭdebla. Kelkaj ektimas. Aŭskultu ! La ŝiprompiĝoj estas oftaj en tiu regiono ; tion povas certigi la soldatoj kaj iliaj rakontoj ne estas kuraĝigaj. Precipe ilia brigadisto, iu ĉiam ŝercanta Parizano havigas al vi la anserhaŭton.

— Ŝiprompiĝo ? Tre amuza afero ! Ni kvietiĝos nur je glacia bano kaj oni kondukos nin al Bonifacio, kie ni pasigos tempon manĝante mirlojn ĉe la mastro Lionetti.

Kaj la soldatoj ridis.

Subite, krakon... Kio estas tio ? Kio okazas ?

— La stirilo estas for, anoncas ŝipano, tute malseka, kiu trakuras la interferdekon.

— Bonan vojaĝon ! krias la petolema brigadisto, sed nun neniu kuraĝas ridi.

Granda konfuzego sur la ferdeko. La nebulo malebligas ĉian vidpovon. La ŝipanoj iras kaj venas, terurplenaj, blindopalpe. Sen stirilo, neblas manovri. La drivanta Sémillante estas ventrapida. Je tiu momento la doganisto ĝin distingas ; estas la dek unua kaj duono. Ĉe la pruo de la fregato, oni aŭdas kvazaŭ kanonpafon ! Subrifoj ! Subrifoj ! Finite ! ĉia espero estas for ; oni rapidas rekte al la rokbordo ! La ŝipestro malsupreniras al sia kajuto ; post momento, li reokupas sian postenon ĉe la surpoupo — en pompa uniformo. Li volis esti eleganta por alfronti morton !

En la interferdeko, la soldatoj angorplenaj sin rigardas reciproke kaj senbrue. La malsanuloj provas ekstari ; la juna brigadisto ne plu ridas. Tiam la pordo malfermiĝas kaj sur la sojlo aperas la kapelano kun sia stolo :

— Surgenue ! karaj filoj !

Ĉiuj obeas. Per laŭtega voĉo, la sacerdoto komencas la preĝojn por la agoniantoj.

Subite, terurega kolizio, kriego, unu kriego, vastega kriego, brakoj levitaj, manoj, kiuj volas kapti ion, konsternegitaj rigardoj en kiuj la vizio de morto pasas fulmorapide.

Miserikorde !...

Tiamaniere mi sonĝadis la tutan nokton, elvokante post dek jaroj, la animon de la kompatinda ŝipo, kies restaĵoj kuŝadis ĉirkaŭ mi. Malproksime, en la markolo, la ŝtormo koleregis, la flamo de l'bivako kliniĝis pro la vento kaj mi aŭdis nian barkon, kiu dancis ĉe la piedoj de la rokoj, knarigante sian ligkablون.

Tradukis A. RIBOT.

NOTOJ KAJ KLARIGOJ

BONIFACION : Korsika havenurbeto ; ĝia markolo apartigas Korsikon de Sardinio.

KRIMEO : Sudsovetia duoninsulo, ĉe l'bordo de l'Nigra Maro.

TULONO : (France : Toulon) : Granda havenurbo ĉe la Mediteraneo ĉefurbo de la departemento Var.

Emeljano-laborulo kaj malplena tamburo

Estis ĉe unu mastro, laborulo, kies nomo estis Emeljano. Foje, iras Emeljano, laŭ la herbokampo, al sia laborloko kaj rigardas : saltas antaŭ li rano ; li preskaŭ piedpremis ĝin. Transpaŝis ĝin Emeljano. Subite, li aŭdas, ke iu lin vokas de malantaŭe. Li sin turnas kaj ekvidas : staras junulino-belulino kaj diras al li : « Kial vi, Emeljano, ne edziĝas ? ». « Kiel mi povas, kara junulino, edziĝi ? Ja, mi havas nenian havaĵon kaj nenia junulino dezirus edziniĝi al mi ». Sed la junulino diras : « Edziĝu al mi ! ». Ekplaĉis la junulino al Emeljano. « Mi, diris li, edziĝus kun granda ĝojo, sed kie ni vivos ? ». « Kial pri tio zorgi, respondis la junulino, nur necesas pli multe labori kaj malplimulte dormi, do, tiam, ni ĉiam estos sataj kaj bone vestitaj ». « Se tiel, do, bone, diris Emeljano, sed kien ni iros ? ». « Ni iros en la urbon, diris la junulino ». Venis Emeljano kaj la junulino en la urbon. Luis lia junulino malgrandan dometon ĉe la urba rando, geedziĝis kaj ekvivis.

Foje, veturis tiea caro ekster la urbon. Preterveturis li la korton de Emeljano kaj en tiu tempo eliris la edzino de Emeljano, rigardi la caron. Ekvidis ŝin la caro kaj ekmiris : « Kie naskiĝis tia belulino ? ». Haltigis la caron sian kaleŝon kaj alvokis la edzinon de Emeljano demandante ŝin : « Kiu, li diris, vi estas ? ». « Mi estas edzino de la kamparano Emeljano, diris ŝi ». « Kial vi, diris la caro, tia belulino edziniĝis al la kamparaĉo ? Vi devus esti reĝino ». « Mi dankas, respondis ŝi, pro la vorto afabla. Por mi estas pli bone esti kun la kamparano ! ». Konversaciis la caro kun ŝi kaj veturis plu. Revenis li en la palacon. Ne forgesiĝas el lia kapo la edzino de Emeljano. La tutan nokton li ne dormis, pensante pri tio, kiamaniere forpreni de Emeljano la edzinon. Li ne povis elpensi, kiamaniere tion fari. Vokis li siajn korteganojn kaj ordonis, ke ili pripensu tion. Kaj diris la caraj servistoj al la caro : « Akceptu vi, ili diris, Emeljanon en vian palacon, kiel kortiston. Ni lin neniigos per laboro. Do, lia edzino fariĝos vidvino kaj tiam vi povos ŝin preni ». Tiel faris la caro. Sendis por Emeljano, ke li iru al li, en la caran palacon kaj fariĝu kortisto kaj ke li loĝu en la palaco, kune kun sia edzino. Venis soldatoj, diris tion al Emeljano. La edzino, do, diras al la edzo : « Bone, diras ŝi, iru ! Dum tago vi laboros, kaj vespere, revenu al mi ». Iris Emeljano. Venis en la palacon kaj la cara intendanto demandas lin : « Kial, do, vi sola venis, sen la edzino ? ». « Kial mi devas veni kun ŝi, respondis Emeljano, ja, ŝi havas sian hejmon ? ». Oni donis al Emeljano tian laboron en la cara korto, plenumeblian nur pere de du homoj. Komencis Emeljano labori kaj ne esperis ĝin ĝustatempe fini. Sed, jen, li finis la laboron antaŭ ol vesperiĝis. Ekvidis la intendanto, ke li finis la laboron kaj donis al li, por morgaŭ, duoble pli malfacilan. Venis Emeljano hejmen. Kaj en la hejmo estas ĉio purigita, la planko balaita, la formo hejtita, ĉio bakita kaj kuirita. La edzino sidas ĉe la teksa stablo kaj teksas, atendante sian edzon. Renkontis la edzino sian edzon, preparis la vespermanĝan tablon, manĝigis kaj trinkigis lin, kaj komencis demandi pri la laboro. « Kion mi povas diri, respondis Emeljano, estas malbone ; oni donas laboron ne por miaj fortoj. Ili deziras pereigi min per la laboro ». « Sed vi, diras la edzino, ne pensu pri la laboro. Rigardu nek antaŭen, nek malantaŭen ; ĉu multe, ĉu malmulte, vi ĉion sukcesos plenumi. Vi nur laboru ! Ĉio plenumiĝos ĝustatempe ».

Enlitiĝis Emeljano. Frumatene, li, denove, iris la caran korton kaj komencis labori kaj eĉ ne unufoje rigardis malantaŭen. Sed, proksime al la vesperiĝo, li finis la laboron kaj venis hejmen noktumi, ankoraŭ en la tagluma tempo.

Oni komencis donadi al li pli kaj pli malfacilan laboron, sed Emeljano ĉion plenumis ĝustatempe kaj iris hejmen noktumi. Trapasis la semajno. Vidas la caraj korteganoj, ke ne povas ili per malfacilega laboro pereigi la kamparanon. Do, oni komencis doni al Emeljano komplikajn laborojn. Sed vane ! Kaj la ĉarpentistano, kaj tegistan laborojn, ĉion ajn, kion oni komisiis al Emeljano, ĉion li faris ĝustatempe kaj antaŭ la vesperiĝo, li iris hejmen al sia edzino.

Alvokis la caro siajn korteganojn kaj diras : « Ĉu mi vane per pano vin nutras ? Du semajnoj trapasis kaj mi nenian rezulton, de vi, vidas ! Vi deziris nenligi Emeljanon per laboro, sed mi vidas, sidante ĉe la fenestro, ke li, ĉiutage, iras hejmen, kantas kantetojn. Eble vi decidis min priridi ? ». Komencis la korteganoj sin pravigi. « Ni, diras ili, per ĉiuj niaj fortoj penis pereigi lin, antaŭe per malfacilegaj laboroj, sed nenio okazis. Ĉiujn laborojn li plenumis kaj nenio lacigis lin. Ni komencis doni al li komplikajn laborojn, pensante, ke lia saĝo ne sufiĉas por tiaj laboroj, sed ankaŭ en tio ni fiaskis. De kie li prenas la saĝon ? Ĉion li komprenas, ĉion li faras ! Povas esti, ke en li, aŭ en lia edzino, ia magio sin kasas ? Li ege enuigis nin. Nun, ni deziras doni al li la taskon, kiun li ne povos plenumi. Pripensis ni kaj decidis, ke li konstruu, dum unu tagnokto, katedralon. Vi alvoku Emeljanon kaj ordonu, ke li, dum unu tagnokto, konstruu la katedralon, vid' al vide de via palaco. Kaj se li ne konstruos, do, tiam, pro la malobeo, vi ordonos dehaki lian kapon ». Alvokis la caro Emeljanon. « Do, diras la caro, jen al vi mia ordono ; konstruu por mi novan katedralon, vid' al vide de mia palaco, kaj estu ĝi preta al la vespero de la morgaŭa tago. Se vi konstruos, mi vin premios, se ne, mi ekzekutos vin ! ». Aŭskultis Emeljano la carajn vortojn, turnis sin kaj iris hejmen. « Do, pensas li, venis nun la fino de mia vivo ! ». « Preparu vin, edzino, diras Emeljano veninte hejmen, ni devas fuĝi ien ajn. Se ne, ni pereos ! ». « Pro kio, ŝi diras, vi tiel ektimis, ke eĉ deziris fuĝi ? ». « Kial mi ne ektimu, diras la edzo, ordonis al mi la caro, dum tagnokto, konstrui katedralon. Kaj se mi ne konstruos, li minacas al mi dehaki la kapon. Restas al ni la sola afero, fuĝi, ĝis kiam ni havas ankoraŭ tempon ! ». Ne akceptis la edzino liajn vortojn. « La caro havas multajn soldatojn, ĉie ili vin kaptos. De la caro ni ne povas forkuri kaj ĝis vi havas fortojn, necesas obei ». « Sed kiel obei, se ne estas por mi eble plenumi la taskon ? ». « Ah, karulo, ne ĉagreniĝu ! Vespermanĝu kaj ekdormu. Frumatene vekiĝu kaj vi sukcesos ĉion plenumi ! ». Enlitiĝis Emeljano. Frumatene lin vekas la edzino : « Iru, diras ŝi, kaj rapide finkonstruu la katedralon. Jen prenu la martelon kaj najlojn. Restis por vi nur unutaga laboro ». Venis Emeljano en la urbon. Vere, nova katedralo staras meze de la placo. Sed iomete ne finkonstruita. Komencis Emeljano ĝin finkonstrui. Sufiĉis laboro ĝis la vespero. Vekiĝis la caro, rigardis el la palaco kaj vidas ; staras la katedralo. Emeljano tie paŝadas, ien ajn najlojn martelas. Do, ne ĝojas la caro, ĉagrenas li, ke ne havas li la kialon ekzekuti Emeljanon, ke ne povas li forpreni la edzinon de Emeljano.

Denove vokas la caro siajn korteganojn. « Plenumis Emeljano, ankaŭ, tiun-ĉi taskon, ne estas la kialo por lin ekzekuti. Ne estas malfacila, diras la caro, tiu-ĉi tasko por li. Estas necese elpensi ion, pli ruzan, do, vi pripensu. Se ne, mi vin ĉiujn ekzekutos ! ». Do, elpensis la korteganoj por la caro, ke li ordonu al Emeljano fari riveron, ke tiu rivero fluu ĉirkaŭ la palaco kaj, ke sur la rivero navigu ŝipoj. Alvokis la caro Emeljanon kaj ordonis al li novan taskon. « Se vi, diras la caro, dum unu nokto povis konstrui la katedralon, do, vi povas, ankaŭ, plenumi

tiun-ĉi taskon. Estu ĉio preta morgaŭ, laŭ mia ordono. Se ne estos preta, mi dehakos vian kapon! ».

Pli malĝoja fariĝis Emeljano. Venis li al la edzino, plena de ĉagreno. « Kial, diras ŝi, vi ĉagrenas? Eble, al vi novan taskon donis la caro? » Kaj Emeljano ĉion rakontis al ŝi. « Necesas, li diras, fuĝi! ». Sed la edzino diras: « Nenien vi fuĝos de soldatoj, ili vin kaptos ĉie. Necesas esti obeema! ». « Sed kiel mi povas obei? ». Ah, diras ŝi, ne ĉagreniĝu. Vespermanĝu kaj ekdormu! Frumatene vekiĝu kaj tiam ĉio estos en ordo! ». Ekdormis Emeljano. Frumatene lin vekis la edzino. « Iru, diras ŝi; al la palaco. Tie estas jam ĉio farita. Nur ĉe la kajo, vid' al vide de la palaco estas malgranda tergibeto. Prenu la fosilon kaj forfosu ĝin ».

Iris Emeljano kaj venis en la urbon. Ĉirkaŭ la paŭso fluas rivero, sur ĝi la ŝipoj navigas. Aliris Emeljano al la kajo, situanta vid' al vide de la palaco, rigardas. Jen estas malgranda tergibeto. Emeljano forfosis ĝin.

Vekiĝis la caro kaj vidas la riveron tie, kie iam ĝi ne estis kaj ŝipoj navigas sur ĝi, kaj Emeljano tie forfosis la tergibeton. Terurigis la caro kaj ne ĝojas li pri la rivero kaj la ŝipoj. La ĉagreno lin ekregis, ke ne povas li Emeljanon ekzekuti. Pensis li: ĉiajn taskojn povas plenumi Emeljano. Kion, do, li nun entreprenu? Vokas la caro siajn korteganojn kaj komencis kun ili cerbumi. « Elpensu, diras la caro, tian taskon, kiun ne povus plenumi Emeljano. Ĉion, kion vi antaŭe elpensis, ĉion li plenumis kaj tial, mi ne povas forpreni de li, lian edzinon ». Pensis, pensis la korteganoj kaj elpensis: « Necesas voki Emeljanon kaj diri al li, ke li IRU TIEN, NESCIANTE KIEN, kaj ke li alportu TION, NESCIANTE KION. Nun li ne povos plenumi la taskon, ĉar kien ajn li irus, vi povos diri, ke li ne tien iris; kion ajn li alportus, vi povos diri, ke li ne tion alportis, kion vi volis. Tiam, oni povas lin ekzekuti, kaj preni lian edzinon ». Ekĝojis la caro. « Tion ĉi vi ege saĝe elpensis, diris li ». Alvokis la caro Emeljanon kaj diras li: « IRU TIEN NESCIANTE KIEN kaj alportu TION NESCIANTE KION! Se vi ne plenumos la taskon, mi forhakos vian kapon ».

Venis Emeljano al la edzino kaj diris al ŝi tion kion postulis de li la caro. La edzino ekmeditis. « Nu, diris ŝi, oni bone instruis la caron kontraŭ vi. Nun estas necese agi saĝe ». Sidis, sidis la edzino enpensiginta kaj komencis diri al la edzo: « Vi nun devas iri malproksimen, al nia avino, al mia antikva, kamparana, soldata Patrino kaj necesas peti ŝian helpon, kaj kiam vi ricevos de ŝi la ajon, iru rekte en la palacon kaj mi estos tie. Nun mi ne povas eviti la manojn de tiuj, kiuj loĝas en la palaco. Ili min prenos perforte, sed ne por longa tempo. Se vi ĉion faros, kiel diros al vi la avino, vi min, baldaŭ, liberigos ». Provizis la edzino Emeljanon per saketo kaj ŝpinileto. « Tion-ĉi, diris la edzino, donu al la avino. Laŭ tiuj-ĉi aĵoj ŝi ekscios, ke vi estas mia edzo ». Montris la edzino la vojon al la edzo. Ekiris Emeljano, eliris ekster la urbon kaj vidas, oni ekzercas soldatojn. Ekrapidis Emeljano kaj komencis rigardi la ekzercadon. Ekzerciĝis la soldatoj iom da tempo kaj eksidis por ripozi. Aliris Emeljano la soldatojn kaj demandis: « Ĉu vi scias, karegaj, kie estas IRI TIEN, NESCIANTE KIEN kaj kiel oni povas alporti TION, NESCIANTE KION? ». Aŭdis tion la soldatoj kaj ekmiris. « Kiu, ili diras, sendis vin tion serĉi? ». « La caro, respondis Emeljano ». « Ni mem, diras la soldatoj, IRAS TIEN, NESCIANTE KIEN. Sed ni ne povas ĝisiri kaj ni serĉas TION, NESCIANTE KION kaj ne povas trovi. Ni ne povas helpi al vi ». Sidis Emeljano iom da tempo kun la soldatoj kaj ekiris pluen. Iris li, iris kaj atingis arbaron. En la arbaro staras kabaneto. En la kabaneto sidas ege maljuna virino, la kamparana, soldata patrino, lanon ŝpinas, ploras kaj la fingrojn malsekigas ne per salivo, sed per larmoj. Ekvidis la maljunulino Emeljanon kaj ekkriis al li: « Kial vi venis? ». Donis al ŝi Emeljano la ŝpinileton kaj diris, ke lin sendis la edzino. La maljunulino mildiĝis kaj komencis demandi, kaj Emel-

jano rakontis al la avino la tutan vivon; kiel li edziĝis al la junulino, kiel ili transiris loĝi en la urbon kaj kiel oni lin dungis kiel kortiston, kiel li servis en la palaco, kiel li konstruis la katedralon kaj kiel li faris la riveron kaj la ŝipojn kaj kiel, nun, la caro ordonis al li IRI TIEN, NESCIANTE KIEN kaj alporti TION, NESCIANTE KION.

Aŭskultis la maljunulino kaj ĉesis plori. « Do, bone, ŝi diras, sidigu kaj manĝu ». Manĝis Emeljano kaj komencis la maljunulino paroli al li: « Jen, ŝi diras, la fadenvolvajo. Rulu ĝin antaŭ vi kaj sekvu ĝin tien, kien ĝi ruliĝos. Vi devas iri malproksimen, ĝis la maro. Aliros vi la maron kaj ekvidos vi grandan urbon. Eniru en la urbon kaj petu, ke oni enlasu noktumi en la ekstreman domon. Ĉi tie, vi serĉu tion, kion vi bezonas ». « Sed, kiama-niere mi ĝin rekonos? », demandis Emeljano. « Kiam vi ekvidos tion, kion oni obeas pli ol patrinon kaj patron, ĝi estas tio, kion vi bezonas. Kaptu ĝin kaj portu al la caro. Alportos vi ĝin al la caro kaj li diros al vi, ke vi alportis ne tion, kio estas bezonata, sed tiam vi diru: « se tio ĉi ne estas bezonata, necesas ĝin disrompi! ». Do, ekbatu tiun ajon kaj portu ĝin al la rivero, disrompu ĝin kaj jetu la rompitaĵojn en la riveron. Tiam vi reakiros la edzinon kaj sekigos miajn okulojn de larmoj ». Adiaŭis Emeljano la avinon. Ekiris Emeljano, rulante la fadenvolvajojn. Rulis li, rulis kaj venis lin la fadenvolvajo al la maro. Ĉe la maro staras granda urbo. Ĉe la ekstremo de la urbo staras granda domo. Petis Emeljano, ke oni permesu al li noktumi en la domo. Oni enlasis lin. Li ekdormis. Frumatene li vekiĝis kaj aŭdas, ke la mastro de la domo vekiĝis kaj vekas sian filon, sendas lin haki lignon por la hejtado. Sed la filo ne obeas dirante, ke estas ankoraŭ frue: « Mi sukcesos pli poste ». Aŭdas tion la patrino kuŝanta sur la forno kaj ankaŭ diras: Iru filjo, ja, ĉe la patro la ostoj doloras. Ĉu li povas haki ia lignon? Iru, jam estas tempo! ». Sed la filo nur smaĉis per lipoj kaj, denove, ekdormis. Sed subite ekbruegis, ekkrakis io en la strato. Eksaltis la filo, sin vestis kaj elkuris straton. Eksaltis ankaŭ Emeljano kaj postkuris la filon de la mastro por rigardi kio bruegas kaj kion ia filo obeis pli ol la patron kaj la patrinon...

Elkuris Emeljano straton kaj vidas, ke paŝas laŭ la strato homo, portante sur la ventro rondan ajon kaj batas ĝin per bastonetoj. Alkuris Emeljano kaj komencis rigardi la ajon. Vidas li, ke ĝi estas ronda kiel barelo kaj de ambaŭ flankoj ĝi estas tegita per led. Komencis li demandi la nomon de la aĵo, kio ĝi estas. « La tamburo », oni respondis. « Do, ĉu ĝi estas malplena? ». « Jes! », oni diras. Ekmiris Emeljano kaj komencis peti la ajon. Sed oni ne donis ĝin al li. Ĉesis Emeljano peti kaj komencis ĉien sekvi la tamburiston. Dum la tuta tago iradis Emeljano kaj kiam la tamburisto ekdormis, Emeljano kaptis la tamburon kaj forkuris. Li kuris dum longa tempo kaj finfine alvenis sian urbon, sian hejmon. Pensis, ke li povos vidi la edzinon sed ŝi forestis. Sekvatage, post la foriro de Emeljano, oni ŝin forkondukis al la caro. Iris, do, Emeljano en la palacon kaj diris, ke oni informu la caron pri lia alveno, ke venis tiu, kiu iris TIEN, NESCIANTE KIEN kaj ke li alportis TION, NESCIANTE KION. Oni informis la caron. Ordonis la caro, ke Emeljano venu morgaŭ. Komencis Emeljano peti, ke oni, denove, informu la caron pri li. « Mi, li diris, nun alportis tion, kion li ordonis al mi alporti, do la caro eliru. Se ne, mi mem iros al la caro! ».

La caro eliris kaj diras: « Kiel vi estis? ». Emeljano respondas. Sed la caro diras, ke ne tie li estis. « Kaj kion vi alportis? ». Deziris Emeljano montri ĝin, sed la caro ne deziris ĝin rigardi: « Ne tion vi alportis. Necesas ĝin rompi kaj diable estu kun ĝi! ». Eliris Emeljano el la palaco kun la tamburo, kaj komencis ĝin bati. Kiam li ekbatis la tamburon, tuj alvenis la tuta cara armeo al Emeljano. Oni salutis Emeljanon, atendas de li ordonon. Komencis la caro krei je sia armeo, ke ili ne

sekvu Emeljanon, sed la armeo ne obeas la caron; sekvas Emeljanon. Ekvidis tion la caron kaj ordonis ke oni redonu al Emeljano lian edzinon kaj la caro petis, ke Emeljano donu al li la tamburon. « Mi ne povas, respondis Emeljano, oni ordonis al mi disrompi kaj la rompitajojn ĵeti en la riveron ». Aliris Emeljano al la rivero kune kun la tamburo kaj ĉiuj soldatoj lin sekvis. Disrompis la tamburon Emeljano, ĉe la rivero kaj la rompitajojn

ĵetis en la akvon kaj tuj ĉiuj soldatoj diskuris. Prenis Emeljano sian edzinon kaj ili kune iris al sia hejmo. De tiu tempo la caro ne plu persekutis Emeljanon. Kaj Emeljano vivis, vivis, bonon akiris, malbonon malakiris...

Lev Tolstoj.

Trad. Petro Poliŝĉuk

Humora paĝo

de I. NAGY

Se oni havas protektanton

La bestoj decidis aranĝi grandan arbaran muzik-festivalon kaj luis belan ĉambregon. Ĉiu havis rajton partopreni ĝin kaj ludi kiun ajn muzikilon.

La ĉambrego estis plenplena, ĉar ĉiuj amis la muzikon. Laŭ la unua programero leporo ludas violonĉelon. La aŭskultantoj ekscitite atendis ĝian ludon. La leporo ekludis, sed la vulpo baldaŭ ekvoĉis:

— Vi ludas terure malbone violonĉelon, tio doĉaras mian kapon!

La leporo diris nenion, ĉesigis la ludon kaj petis la vulpon veni kun li elen. Post kelkaj minutoj la leporo revenis kun la felo de la vulpo, kiun ĝi ĵetis sur la fortepianon kaj ludis plu violonĉelon.

La tuta aŭskultantaro maltrankvile moviĝis, ĉar enpense ili pravigis la vulpon, kiam la lupro diris laŭtvoĉe:

— Leporo, via ludo frenezigas nin, vi estas sentalentulo, indulgu niajn nervojn!

La leporo ree ne respondis, nur petis ĝin eliri kun ĝi. Post kelkaj minutoj ĝi revenis portante kun si la felon de la lupro, kiun ĝi ĵetis facilmove sur la fortepianon kaj... ludis plu violonĉelon.

Sed nun la urso ekmurmurvoĉis tre minace kaj kolere:

— He, vi leporaĉo, ĉesu ludi kaj forvaporigu, ĉar jam eĉ miaj oreloj ne povas toleri plu ĉi tiun knaradon!

La leporo diris nenion, nur petis ĝentile la urson veni kun li el la ĉambrego. Post iom da tempo aperis la leporo kun la felo de la urso, kiun ĝi ĵetis malestime sur la fortepianon, sidiĝis, enmanigis al si la violonĉelon..., kiam aperis ĉe la pordo la leono kaj diris.

— Al kiu ne plaĉas la violonĉela ludo de mia amiko? ... nun diru tion al mi!

En Irano okazis...

... ĉ. antaŭ dekkvin jaroj, kiam Esperanto ankoraŭ ne furoris tie. Delegacio faris oficialan viziton en la lando de la ŝaho. Post la hejmenveno iu delegaciano tuj telefonis al mi.

— Imagu, mi renkontis esperantiston en Irano, kiam ni ekskursis al Ispahan.

— Mi ĉiam diris al vi, ke esperantistoj troviĝas ĉie, kvankam oni ne scias pri ili. Kaj ĉu vi povis paroli kun li?

— Pere de interpretisto, kiu estis ĉiam kun ni.

— Streĉe mi aŭsultas vin.

— Ni estis en la malnova urbo Ispahan kaj rigardis la urbo-pordegon, kiam venis al ni juna oficiro, demandante ion al ni, el kio mi komprenis; Esperanto.

— Certe li demandis, kiu parolas Esperante?

— Jes, ĉar li ripetis tion angle, sed ni apenaŭ komprenis lin.

— Kvankam la angla estas mondlingvo, ĉu ne? Kaj?

— Tuj mi pensis je vi; kia domaĝo, ke vi ne estas ĉi tie.

— Dankon!

— La juna oficiro rakontis, ke li havis stipendion kaj en Prago vizitis Aŭtlernejon dum tri jaroj. Li aŭdis pri Esperanto, la lingvo ekplaĉis al li kaj dum lia restado ellernis ĝin. Bedaŭrinde nun li ne povas praktiki la lingvon. Ĉion ĉi la interpretisto tradukis al la delegacio, kies membroj kun intereso aŭskultis lin. Mi diris al ili, ke mi rakontos ĉi tiun renkontiĝon al vi, ke vi ĝoju.

— Mi ĝojas kaj mi petas vin skribi ĉi tiun okazaĵeton, kiun mi sendos al nia hungarlingva revuo. Vi eĉ monon ricevos!

— Mi skribos ĝin, sed ne scias kiam, ĉar nun mi ne havas tempon.

— Konsentite kaj dankon. Ne forgesu pri via promeso!

Bedaŭrinde lia promeso neniam efektiviĝis, vane mi instigis lin al « verkado ». Kiam eksplodis la islama revolucio en Irano, hazarde mi aŭdis en la radio la nomon de Ispahan kaj kiel fulmo trakuris mian cerbon, ke antaŭ multaj jaroj juna, irana oficiro alparolis hungaran delegacion en Esperanto.

Kio okazis al li, kiu scias? La vivo jam estigis nek-redeblajn, interesajn okazaĵojn; eble iam, laŭ Kulturaj Kajeroj, li daŭrigos ĉi tiun historieton.

Sinofero sur marŝipo

« Se vi ne estos mia ĉi-vespere,
Dronigos mi la ŝipon plenkolere
Kaj milojn trafos nokte la destino ».
Ŝipestro diras pete al virino.

Sekreton longe ŝi gardi ne povis,
Rakonti tion, fine eblon trovis.
« Mi belan nokton kun ŝipestro havis
Kaj minofere, pasaĝerojn savis ».

Besto gis homo :

besto	besto	besto	besto	besto	besto
kesto	testo	beto	resto	festo	beto
kosto	tosto	bato	rosto	fosto	boto
kosmo	kosto	kato	kosto	kosto	hoto
komo	kosmo	koto	kosmo	kosmo	homo
homo	komo	komo	komo	komo	
	homo	homo	homo	homo	

besto	besto	besto	besto	besto
beto	resto	beto	vesto	vesto
peto	reto	boto	vosto	vosto
poto	rito	bovo	kosto	voto
pomo	rimo	povo	kosmo	koto
homo	rumo	pomo	komo	komo
	humo	homo	homo	homo
	homo			

lado	lado	lado	lado
lodo	ludo	laro	pado
kodo	lumo	paro	paro
komo	pumo	poro	poro
pomo	pomo	pomo	pomo

Enigmo (proponita de S. Nagy) :

- 1) — Inklino al persono aŭ ideo (R), kun artikolo.
- 2) — Kurbolinio ; parto de cirklo.
- 3) — Travidebla, rompebla substanco (R).
- 4) — Agi same kiel alia persono (R).
- 5) — La « eterna urbo ».
- 6) — Malsano de la orelo (R).
- 7) — Malplezuri pro senintereso (imperativo).
- 8) — Produkti idon parolante pri ino (R).
- 9) — Densa hararo kovranta kelkajn bestojn.
- 10) — Membro.

[illegible]

GRAMATIKO PER BONHUMORO



Naskiĝo ĉe la ADJEKTIVA RADIKO

Ĉiama maljusteco :

1) DE ALIAJ ADJEKTIVOJ HELPE DE :


ET, EG, MAL, NE, kiuj tute ne modifas la gramatikan karakteron de tiu radiko : varmeta, varmega, malvarma, nevarma.

2) DE VERBOJ HELPE DE :

- **verbaj finaĵoj** — (I, AS, OS, U, US, anta...) — (furiozi, utilas, kuraĝanta, verdi, bluas, varmos).
- IGI, kiu montras, ke oni metas ion (iun) en tiun staton — (purigi, surdigi, blankigi).
- IGI, kiu montras, ke oni venas mem en tiun staton (grandiĝi, koleriĝi).

3) DE SUBSTANTIVOJ por montri :

- estaĵon vivantan (ulo) junulo,
 - estaĵon nevivantan (aĵo) : necesaĵo, riĉaĵo ;
 - kvaliton, abstraktecon (eco) acideco, stulteco.
- RIM, por esprimi ĝeneralan sencon, oni povas uzi :
belo, bluo, varmo, nigro, sano.



Se estus mi, kiu estus farinta tiun flakon, vi povas esti certa, ke ŝi diable furiozus kontraŭ min !

Oni ne estas tia, kian oni sin kredas :

Stultaĵoj :



Aŭskultu tiujn malsaĝulojn ! Kiel ili bruas por tiel malgranda naskitaro !



Li kredas fanfaroni antaŭ mi kaj ĉarmi min per tiuj aĉaj sonoj ; feliĉe miaj oreloj...

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (850 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (10 600 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskaga 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721. (22 guld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bøe Maridalsveien 128 A OSLO 4.
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).
Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.